

Okdek jaroj de esperanta vivo, 4-a parto

La Dua Libro

Claude Gacond, 174-a radioprelego, 1967.02.08 & 1967.02.11

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Zamenhof ne nur asertis, ke estas necese apartigi la kreitaĵon de la kreinto, li tuj volis efektiviĝi tiun rompon. Pro tio lia *Antaŭparolo* al la *Dua Libro* verkita, kiam la lingvo ne ankoraŭ estis dujara, finiĝas per adiaŭo de la aŭtoro. Aŭdu :

A.- « *Tiu ĉi libreto estas la lasta vorto, kiun mi elparolas en la rolo de aŭtoro. De tiu ĉi tago la estonteco de l' lingvo internacia ne estas jam pli multe en miaj manoj, ol en la manoj de ĉia alia amiko de la sankta ideo.* »

Cl.- Tuj post tiu adiaŭo Zamenhof salutas tiujn amikojn kaj asertas, ke inter ili troviĝas luktantoj pli fortaj, ol li. Tiuj paroloj vekis la kapablojn. Aŭdu :

A.- « *Ni devas nun ĉiuj egale labori, ĉiu laŭ siaj fortoj, ĉiu el vi povas nun fari por nia afero tiom same kiom mi, kaj multaj el vi povas fari multe pli multe ol mi.* »

Cl.- Zamenhof estis la kontraŭo de Schleyer, la kreinto de la lingvo Volapük, kiu fariĝis speco de ĉiopova papo. Zamenhof volis iniciati, instigi, veki. Li ne volis regi.

A.- Kaj parolante pri sia kreitaĵo, li pli parolas pri afero, pri sankta ideo, ol pri lingvo. Oni ofte miris pri tio. Estas, ke la lingvo, por la doktoro Esperanto, estas portanto de ideo. Zamenhof estis certa, ke lia lingvo estas vojo kondukanta al vera pens-revolucio. Disvastigi tiun lingvon estis por li devo.

Cl.- Por tiu devo li ĉion oferis. Aŭdu lin:

A.- « *Mi faris por la afero ĉion, kion mi povis, kaj se ĉiu efektiva amiko de l' lingvo internacia alportos al ĝi eĉ la centan parton de l' moralaj kaj materiaj oferoj, kiujn mi al ĝi alportis tra dekdu jaroj ĝis hodiaŭ, tiam la afero iros bonege kaj venos al la celo. [...] Ni laboru kaj esperu !* »

Cl.- Legante tiujn liniojn la unuaj adeptoj de la Lingvo internacia komprenis subite la signifon de la poemoj de Doktoro Esperanto:

*Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj !
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj !*

*Kion havis mi plej karan –
La junecon – mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta !*

A.- Tiuj versoj eble iom tro romantikaj certe esprimas la lacon pro la longa serĉado. Ili respegulas la spiritostaton de tiu junulo, kiu oferis siajn fortojn centprocente al nur unu celo.

Cl.- Subite la genia malkovro alportis febran esperon. La koro batas, ĉar la venko eksonas. Dua poemo lumigas tiun spiritostaton. Nun ni ne plu sentas nin premataj pro malĝojo, sed pro maltrankvilo, urĝemo :

A.- *Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto, nun ne saltu for !
Jam teni min ne povas mi facile
Ho, mia kor' !*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 4-a parto

La Dua Libro

Claude Gacond, 174-a radioprelego, 1967.02.08 & 1967.02.11

*Ho, mia kor' ! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor' !
Sufiĉe ! trankviliĝu de l' batado.
Ho, mia kor' !*

Cl.- Tiuj poemoj, kaj la **antaŭparoloj** al la *Dua Libro* kaj al la *Aldono al la Dua Libro* estas speco de literatura trezoro, kiun ni povus studi dum horoj. En tiuj tekstoj la penso riĉas kaj samtempe la lingvo belsonas. Kaj ĉion povas esprimi tiu doktoro Esperanto nur per apenaŭ milradika idiomato. Ni povas kompreni la entuziasmon, kiun vekis tiuj tri broŝuroj ĉe la tiamaj legantoj.

A.- Kaj tiu entuziasmo ne ĉesis. La freŝo de la lingvo konserviĝis kaj la penso restis aktuala. Ĝi restos aktuala tiom longe, kiom esperanto restos ilo, vojo, pordo pretiganta kaj kondukanta al nova spirito homara.

Cl.- Edmond Privat en belegaj versojn salutas en Zamenhof la semanton de semoj, kiuj kondukos la homojn al vivo sen limo. Aŭdu :

A.- *Al ĉiuj popoloj benatan donacon
Vi faris, trafante la vojon plej bonan :
En koroj de l' homoj eksemis vi pacon,
Sur lipoj semante la lingvon belsonan.

Nun kreskas en mondo spirito homara,
Kaj iom el via noblega animo,
Per ĉiu parolo de lingvo la kara
En koroj vastiĝas al vivo sen limo.*

Cl.- Ni revenu al la paroloj de Zamenhof, kaj al tiu ideo de forlaso de ĉia privilegio super la lingvo. Kelkaj vidis en tiu sinteno de Zamenhof reagon kontraŭ la sinteno de Schleyer. Povas esti, ke la diktatoremo de la papo de la volapukista mondo kondukis Zamenhofon al meditado pri la danĝeroj de la regemo. Tamen la sinteno de Zamenhof estis tro konstanta por esti nur frukto de reago. Ni ne forgesu, ke doktoro Esperanto faris medicinajn studojn. Li lernis rigardi al la naturo kun la respekto de biologo, de observanto, kiu serĉas la sekretojn de la vivo, por helpi la vivon.

A.- Kiel biologo li observis la lingvajn fenomenojn. Li malkovris gravajn leĝojn, kaj scias, ke nur submeto al ili ebligas al lia Lingvo internacia reale ekvivi.

Cl.- Se do li rezignas ludi pli longe la rolon de kreanto, tio estas, ĉar li scias, ke nasko okazas nur unufoje. Se la naskito vivas, ĝi estas sendependa de la naskinto.

A.- Zamenhof obeas al la postuloj de la vivo, por ke la naskito fariĝu ne nur monstro mortnaskita, sed vivipova lingvo. Aŭdu :

Cl.- « *Se mi senigas min nun je ĉiaj personaj privilegioj, kaj fordonas ilin tute al la publiko, mi ĝin faras ne pro malvera modesteco, sed ĉar mi havas la profundan kredon, ke tion postulas la intereso de la afero, kiu alie ne povus regule kaj rapide vastiĝi kaj ĉiam estus en dependo de unu persono kun liaj eraroj. Nur viva konkursa laboro, ĉe kia ĉio pli bona iom post iom elpuŝas la malpli bonan, - povas doni efektive bonan kaj vivipovantan lingvon internacian.*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-